

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

La 1965-66 konkurso nun finiĝis. La korektantoj laboras. La gajnintoj ricevos la rezultojn rekte. La listo aperos en la venonta numero de Kulturaj Kajeroj. Kaj post libertempo, kiun ni deziras fruktedona kaj ĝojplena, komenciĝos nova konkurso.

..

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solve de la lastaj problemoj :

La miksaĵo. — Ni supozu, ke la miksaĵo entenas 30 centojn da litroj. La sama kvanto da la pli multekosta vino estus : $150 \times 30 = 4500$ fk. 30 litrojn da miksaĵo kostas $140 \times 30 = 4200$ fk. La diferenco kun la prezo de la miksaĵo estas : $4500 - 4200 = 300$ fk. Kiam vi anstataŭas unu centon da litroj de la unua vino per sama kvanto da la alia, la diferenco estas : $150 - 135 = 15$ fk.

$$300 : 15 = 20$$

Oni devas preni 20 centojn da litroj de la dua vino kaj $30 - 20 = 10$ centojn da litroj de la unua vino. Do proporcio : 10 1

$$\frac{10}{20} = \frac{1}{2}$$

Kompletigu :

884767	85
85	10409
34	
347	
340	
776	
767	
765	
2	

Ekspliko : la dividanto estas 85. La dua cifero de la kvociento estas « 0 » ĉar $34 < 85$.

La produkto $85 \times 9 = 765$; $765 + 2 = 767$.

La lasta parta dividato estas 767, kies 3 ĉiferoj estas la tri ciferoj de la dividato kiu estas 884767. La tria parta dividato estas « 76 » ; $76 < 85$. La kvara cifero de la kvociento estas « 0 ». Tiu kvociento estas 10409.

NOVAJ PROBLEMOJ

Kurioza maniero vojaĝi :

Du personoj havas nur unu biciklon por iri de A ĝis B. $AB = 20$ km. Ili foriras de A samtempe la unua bicikle ĝis punkto C inter A kaj B je rapido de 15 km./h. ; la dua piede je rapido de 4 km./h. Kiam la unua persono atingas la punkton C, li metas la biciklon sur la bordo de la vojo kaj daŭrigas la iradon piede je rapido de 5 km./h. La dua persono trovas la biciklon, ekrajdas ĝin kaj finas la vojiradon je rapido de 12 km./h. La du persono alvenas en B samtempe.

Kalkulu la distancon AC.

..

LABIRINTO

La ruza simieto

Ĝi jetas kokoson de la supro de la arbo. Kiu viro ĝin ricevos ? Sekvu la direkton indikitan de la montrosagetoj.

